BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

# Sonorilo



54-a jaro - n° 3
Aprilo - Majo 1962

Demandu provveturon per la nova

**Ford Anglia**

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE TEL. 34611

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

redakcio : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :
Couwenberg F.
Dr. Pol Denoël
De Cuyper Georges
Bruno Denoël
De Marré Luc
Iserentant Roger
Poupeye Charles

Belga Esperanto Federacio

asocio sen profita celo
De Bruynlaan 44, Wilrijk tel. (03) 377758

**honora prezidanto**
Kempeneers Paul

**honora vicprezidanto**
Sielens Henri

**prezidantoj**
Debrouwere Gerard
Jaumotte Maurice

**ĝenerala sekretario**
De Marré Luc, Groenendaallaan 232, Antwerpen tel. (03) 411912

**sekretario por la flandralingva regiono**
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr 51, St-Kruis tel. (050) 34935

**sekretario por la franclingva regiono**
De Cuyper Georges, 44 rue du Temple, Courcelles (Hainaut)

**kasistinoj**
Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent
Van Herck-Huysmans, provizore :
De Bruynlaan 44 Wilrijk

**reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio**
Couwenberg F., Koninginnelaan 14, Blankenberge
p.k. nr 4161.35

**poŝtkontoj de B.E.F. :**
de la antaŭa R.B.L.E. : 1337.67 Wilrijk
Flandra Ligo : 2321.50 Gent

# 8A BENELUKSA KONGRESO

## *Hago la 9an, 10an, 11an de junio 1962*

### *Programo:*

Sabaton, 9 - 6 - '62

*15a horo: Malfermo de la akceptejo, Interkonatiĝo*

*16,30a » : Hisado de la flagoj, kun trumpetsonado*

*16,45a » : Komuna Fotografado*

*17a » : Oficiala malfermo de la Kongreso*

*Salutparoladoj de la asociaj prezidantoj*

*Simpati-esprimoj de aliaj nederlandaj asocioj*

*Parlamentano Mag. van Rijckevorsel*

*18a » : Libera tempo: manĝado, ktp*

*20a » : Prelego de D-ro Lapenna*

*21a » : Intima kunesto ĝis... kiam oni deziras enlitiĝi*

Dimanĉon, 10 - 6 - '62

*Inter 9a kaj 10a ebleco sekvi katolikan aŭ protestantan Di-servon*

*10,30a horo Prelego de S-ino Lapenna*

*11a » : Festkunsido de B.E.F.*

*Laborkunsido de LEEN*

*Posttagmezo : Liberaj malgrandaj ekskursoj, ĉu al Madurodam, ĉu al la marbordo (Scheveningen), ktp.*

*19a » : Oficiala bankedo en hotelo „Den Hout"*

*21a » : Oficiala Balo (ĝis... plenlaciĝo)*

Lundon, 11 - 6 - '62

*8,15a horo : Ekskurso*

*16a » : Reveno al Hago. Finiĝo de la ekskurso kaj de la kongreso.*

*Enskribu tuj : PK. de la Federacio (vidu 1 paĝo)*



## INFORMAJ SERVOJ

Laŭ decido de la estraro, ĉiuj informoj pri Esperanto nome de la Federacio, eliras de la informaj servoj, kiuj estas prizorgataj de la regionaj sekretarioj.

Por ebligi racian kunlaboradon inter tiuj servoj kaj la grupoj kaj membroj, ni petas ke petoj por kursoj aŭ informoj elirante de persono kiu ne loĝas en la loko de la grupo aŭ de la membro, estu transdonataj al la informaj servoj, kiuj sendos la informojn, kune kun propagandaĵoj, al la petinto, kaj komunikos la adreson al la grupo aŭ la reprezentanto kiu kunvenas aŭ loĝas plej proksime.

Laŭ la sama decido la gazetaraj servoj estos prizorgataj de la jam menciitaj personoj, kaj ili petas ke, se ek de nun ili forsendos al la gazetaro la informojn pri Esperanto kiuj interesigos la publikon, la membroj iom kunlaboros eltondante el la gazetoj la tekstojn kiuj estas publikigitaj, pri Esperanto, kaj sendos ilin al unu de la servoj, laŭ la lingvo de la teksto. Ni scias ke ekzistas institutoj kiuj kontraŭ pago, eltondos ĉion pri Esperanto el la jurnaloj kaj revuoj, sed, en unu jaro, la kostoj sumiĝus je kelkaj miloj da frankoj, kaj ni certe povas alimaniere kaj pli bone elspezi tian sumon.

## NI REMEMORIGAS....

LA KOTIZOJ PAGOTAJ DE LA INDIVIDUAJ MEMBROJ ESTAS POR 1962 JENAJ:

| | |
|---|---|
| BONFARA MEMBRO | 150 F |
| MEMBRO (KUN ABONO) | 100 F |
| FAMILIA MEMBR(IN)O | 50 F |
| JUNULOJ (18 ĜIS 21-JARA) | 50 F |
| KADETO (ĜIS 18-JARA) | 25 F |
| KURSANOJ | 50 F |
| ABONOJ | 80 F |

LA RESPEKTIVAJ POŜTKONTOJ ESTAS:

R.B.L.E. BRUSELO N° 13.37.67

F.L.E. GENTO N° 23.21.50

# Historia Kroniko

Tiu preĝejo, kiu estis la katedralo, ne plu ekzistas. Dum la Franca revolucio ĝi estis detruata. Ĝi staris sur la Burgplaats (burgoplaco = fortikaĵloko) tie kie estas nun la arboj. Post la Franca revolucio, kiam estis denove episkopoj en Brugge, la preĝejo de la Sankta Savinto iĝis la katedralo. Ŝajne tiu preĝejo estis tre interesa ankaŭ laŭ arkitektura vidpunkto. La konstrumaniero estis la sama kiel de la du imperiestraj kapeloj en Nijmegen kaj Aken. Oni ne precize scias kiam ĝi estis ekkonstruata. Sed la du ĵus nomitaj datumas el la regno de imperiestro Karlo la Granda kiu mortis en 814. Kaj tre verŝajne iu fortikaĵo (kun kapelo aŭ preĝejo?) estis konstruata en la daŭro de la 9a jarcento por malhelpi la invadon de la Nordmanoj. Sed mi volas peti vian atenton por io alia. Dum mi faris historiajn serĉojn pri la Bruĝaj preĝejoj, mi trovis liston de la sanktrestaĵoj konservitaj en la S-ta Donacianokatedralo. Mi trovis ĝin en dokumentaro datumanta el la 14a jarcento. La mezaĝo estas tempo de tre granda religiemo. Plej gravan gravecon oni atribuis al la posedo de sanktrestaĵoj. Grandegaj festoj okazis kiam oni transportis sanktrestaĵojn. Tiuj objektoj estis konsiderataj kiel plej taŭgaj protektiloj. La posedo de granda kvanto da tiaj aĵoj plialtigis la gloron de iu preĝejo aŭ monaĥejo. La religiaj komununoj havantaj riĉan kolekton da relikvoj kredis sin en rajto al akiro de favoroj diversspecaj. Tial oni ne timis "fabriki" relikvojn! aŭ steli, aŭ rabi, aŭ militi. En 1127 la Grafo de Flandrujo Karlo la Bona estis mortigata en nia S-ta Donacianopreĝejo. La mortigintoj protektis sin en la preĝejo mem kie kuŝis la korpo de l'mortigito. De ekstere oni klopodis enveni la konstruaĵon. Inter la trupoj kiuj volis venĝi la grafon, estis ankaŭ grupo da Gentanoj. Dufoje, nokte, du soldatoj klopodis en sekreto enveni laŭ la altaj fenestroj. Sed dufoje, pro la malhelo kaj ne sufiĉa kono de la konstruaĵo, ili falis kaj perdis la vivon. La Bruĝa kronikisto kiu ĉion rakontas pri tiuj okazintaĵoj kaj kiu travivis ilin ĉiujn diras ke la Gentanoj faris tion por ŝteli la korpan relikvon de la Grafo kaj forporti ĝin al Gent.

Jen mi tradukas preskaŭ laŭlitere la liston el la Latina lingvo.

" Ĉi sekvas la relikvoj de la sanktuloj kiuj estas en la preĝejo de S-ta Donaciano kaj unue tiuj kiuj rilatas al la Disinjoro Jezuo Kristo. Multo de Liaj vestaĵoj, de Liaj sandaloj, de Lia loĝejo, de Lia tolaĵo de la ligno kaj kruco de la Disinjoro, de Lia tombejo, de Lia tablo, de Lia spongo, de la ŝtono de l' Disinjoro, de la ujo en kiu la Disinjoro dum la lasta manĝo lavis la piedojn de siaj disciploj, de la viŝtuko per kiu Li sekigis la piedojn, de la kolono al kiu la Disinjoro estis vipata, de la marmoro sur kiu la Disinjoro naskiĝis, de la mantelo per kiu li estis vestata, de la vinberujo kiun la Disinjoro plantis, de la bastono de Aaron per kiu li faris mirakolojn en Egiptujo kaj per kiu li kondukis la popolon de la Disinjoro tra la reĝa maro kaj tra la dezerto. De la Kalvarimonto, de la Olivomonto. Iom da tero de la Jordano kaj iom de la orŝtono kiun la saĝuloj oferis al la Disinjoro. De la ŝtono sur kiu staris la Disinjoro kiam Li diris al Petro " vi estas petro k.t.p.... ". Restaĵoj de la kvin panoj kaj de la sep korboj da manao per kiu Li nutris sian popolon en la Dezerto. De la tombejo el kiu Li revivigis Lazaron.

" Relikvoj de la Sankta Maria, patrino de nia Disinjoro Jezuo Kristo. Haroj de la Sankta Maria, patrino de nia Disinjoro Jezuo Kristo. Relikvoj de la S-ta Maria. Lakto de Ŝi. Iom de Ŝia tuniko, de vualo de Ŝi, de mantelo de Ŝi, de vestaĵoj kaj piedvestoj de Ŝi, iom de Ŝia lito kaj aliaj relikvoj de Ŝi.

" Relikvoj de Sankta Johano Baptisto kaj de aliaj profetoj.

" Sango de Sankta Johano Baptisto. Dento de li. Vestaĵoj kaj haroj de li. Iom de lia tombo. Iom de la ostoj de profetoj Samuel kaj Zaharias. Relikvoj de la profeto Jonas, de Sanktaj Simon kaj Anna, kaj de la tri infanoj Sidrak, Misah kaj Abdenago.

" Relikvoj de la apostoloj kaj evangelistoj.

" Dento de la Sankta Petro kaj ostoj de li. Iom de lia barbo kaj de liaj haroj, de lia kruco, de lia tuniko, de lia stolo, de lia katedro. Iom de la tombo de la evangelisto Sankta Johano kaj de la Manao kiu ekfloris el ĝi. Iom de lia tablo kaj de lia lito. Iom da sango de Sankta Paŭlo, de lia barbo, de liaj haroj. Aliaj relikvoj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo. Iom de la kapo de S-ta Bartolomeo. Relikvoj de la apostoloj Andreo kaj Matteo. Ankaŭ iom de la kruco de la apostolo S-ta Andreo. Du dentoj de la apostoloj Jakobo kaj Filipo kaj aliaj relikvoj de ili. Relikvoj de la apostoloj Simon kaj Judo. Iom de la tablo de la apostoloj. Relikvoj de la Martiroj.

" Iom de la ostoj de la Sankta Papo Klemens. De la sango kaj ostoj de la S-ta Stefano. De la ŝtonoj per kiuj li estis ŝtonmortigata kaj aliaj relikvoj de la sama. Fingroj kaj sango de Innocencio. Dento de la S-ta Laŭrentius. Ostoj de li kaj iom de la krado sur kiu li estis rostata. Vestaĵoj de li, zono kaj aliaj relikvoj de la sama.

" Iom de la brako de S-ta Sikstc. Dento de S-ta Kornelio. Relikvoj de la sama kaj ankaŭ de S-ta Cipriano. Dento de S-ta Kristoforo. Osto de lia mano. Osto de lia kapo. Haroj kaj vestaĵoj de li. Fingro de S-ta Sebastiano. Dento de S-ta Kŭinteno. Sango kaj vestaĵoj de li. Relikvoj de la S-ta Dionisio kaj de liaj kunuloj. Haroj de la sanktuloj Krispeno kaj Krispiniano. Ostoj de S-ta Leodegario. Haroj de ili kaj ankaŭ iom de iliaj sandaloj. La sama de la sanktuloj Kosmo kaj Obmiano. Ostoj de la sanktuloj Ionic kaj Paŭlo kaj Pankratio kaj Albano. Iom de la kapo de la S-ta Menna. Iom de la brako de S-ta Georgio kaj aliaj relikvoj de la sama kaj ankaŭ de la sanktuloj Lamberto, Magno, Kalikst. Fingro de S-ta Juliano. Relikvoj de la sanktuloj Marcello kaj Petro; de S-ta Nikasio ĉefepiskopo de Reims kaj de lia fratino; de S-ta Vincentio, Adriano. Relik-

" voj de la martiro S-ta Hipolito. Dento de S-ta Livino.

" Relikvoj de konfesantoj.

" La korpo de S-ta Donaciano kiu estis la sepa ĉefepiskopo de Reims. Granda parto de la korpo de S-ta Krisolio ĉefepiskopo de Amiens. Du dentoj de S-ta Marteno. Ostoj de li. Iom de lia mantelo kaj aliaj vestaĵoj. Ripo de S-ta Mahato (Mahario ?) kaj aliaj ostaĵoj de li. Lia ringo. Fingro de la papo S-ta Gregorio. Osto de S-taj Patricio kaj Albino. Relikvoj de S-ta Severino. Ostoj de S-ta Hilario. Relikvoj de S-ta Germano episkopo de Kapua. Du ripoj de S-ta Maksimo. Lia kruro. Du ostoj de lia brako. Kvin ostoj de liaj fingroj. Fingro de S-ta Benedikto kaj du dentoj de S-ta Bavo kaj lia barbo. La brako de S-ta Gaŭgerici. Relikvo de S-ta Amando kaj iom de lia barbo. De S-taj Vedasto, Remigio, Aŭdomaro du fingroj. Du fingroj de S-ta Bertino. Du fingroj kaj du dentoj de S-ta Vandregiselus. La dekstra dikfingro de S-ta Folkŭino. Unu dento de la S-ta Trudo kaj io de lia kapo. Relikvo de la Sankta papo Aleksandro. Iom de la ŝultro de S-ta Paŭlino ĉefepiskopo. Io de la kapo de S-ta Johano episkopo. Tri dentoj kaj brako de S-ta Teoderiko el Reims. Du fingroj kaj du dentoj de S-taj Odulfo kaj Briktio. Osto de S-ta Eligio. Sep fingroj de S-ta Eŭsebio. Dento de S-ta Rikario. Relikvoj de S-ta Servatio. Relikvoj de S-ta Judoko. Relikvoj de S-ta Remaklo. Io de la kapo de S-ta Nikolao. Relikvoj de S-ta Ambrosio.

" Relikvoj de virgulinoj kaj de sanktaj virinoj.

" Iom de la fingro de S-ta Maria Magdalena. Haroj de ŝi kaj de ŝia fratino Marta. Sango de S-ta Agnes. Aliaj relikvoj de la sama. Relikvoj de S-ta Agata. Vestaĵo de ŝi. Iom da cerbo de S-ta Cecilia. Aliaj relikvoj de la sama. Relikvoj de la S-ta Kolumba. Iom de la ŝultro de la S-ta virgulino Juliana. Ankaŭ iom de la ŝultro de la S-ta virgulino Margareta. Relikvoj de la S-ta Valburga. Tuniko de S-ta Brigida virgulino. Relikvoj de S-ta Gertruda virgulino. Fingro de S-ta Berta. Relikvoj de S-ta Helena.

" Krom tiuj-ĉi relikvoj kiujn ni nomis estas en tiu-ĉi preĝejo honorataj, depost jam tre antikva tempo, multaj aliaj gravaj relikvoj de martiroj kaj atestantoj inter kiuj kelkaj estis papoj, aliaj ĉefepiskopoj, aliaj episkopoj, aliaj pastroj, aliaj ekleziuloj de malplialtaj ordenoj, aliaj estis sanktaj laikuloj, ankaŭ de sanktaj virgulinoj kaj virinoj de kiuj ni silentas la nomon por ke la tro longa citado ne veku enuon ĉe la aŭdanto. Sed ni kredas sen ia dubo ke Dio per iliaj meritaj kaj preĝoj al ni, piuloj, preparos restadejon en la ĉielo. "

Diversaj partoj de tiu-ĉi listo donas la impreson ke la kadavroj de sanktuloj estis tuj post morto distranĉataj (!) Fakte tio okazis ! aŭ preskaŭ.

Ni scias certe ke la popolo tuj venis al iu kiu mortis " en odoro de Sankteco " por akapari pecojn de vestaĵoj harojn kaj eĉ oni tute ne timis forpreni korpopartojn. Per tio ni tamen tute ne volis diri ke ĉiuj tiuj-ĉi nomitaj relikvoj estas aŭtentikaj !

Drs. Fernand Roose.



# KOMUNA LIBRO-SERVO

R. Iserentant
Blankenbergesteenweg, 72
Brugge
P.C. Nr 3268.51

Ni petas al niaj klientoj por kiel eble plej komplete formuli siajn mendojn, se eblas per aldono de la nomo kaj adreso de la eldonejo. Tiu komplezemo konsiderinde helpos nin kaj samtempe estas je via propra avantaĝo koncerne al tuja kaj ekzakta liverado.

A. **Noveldonaĵoj aŭ aktualaĵoj**

- — Amuzo per scienco (albumo riĉilustrita pri sciencaj eksperimentoj fareblaj de infanoj en la hejmo) — bindita 55,— F
- — Malsata ŝtono (kolekto da rakontoj de la mondfama Hinda verkisto Rabintranath Tagore) — bindita 160,— F
- — Natura metodo por resaniĝi (interesa verketo) kovrilo duonkartona 20,— F
- — Memuaro pri geografiaj nomoj (broŝureto pri multe diskutata temo) 8,— F
- — Kien la poezio ? de Brendon Clark (ankaŭ sen peza peza ŝarĝo da neologismoj vera poezio eblas) — bindita 100,— F
- — Amara Pano de J. Darvas (el la hungara literaturo) 60,— F

B. **Malnovaj eldonoj**

- — Akbar (streĉa Orienta romano) — luksa bindo 56,— F
- — La Vojo returne de E.M. Remarque — bindita 40,— F
- — Tartarin de Taraskono de A. Daudet - bela bindaĵo 90,— F
- — Taglibro de Anne Frank — bindita 105,— F
- — Ĉiuj numeroj de la fama " Epoko "-serio ankoraŭ haveblaj ĉe nia komuna libroservo :
  - n° 1 — Murdo en la orienta ekspreso (Agatha Christie) 16.—
  - n° 2 — La knaboj de Paŭlo strato (Francisko Molnàr) 16.—
  - n° 3 — La princo kaj Betty (P.G. Wodehouse) 16.— F
  - n° 4 — La Tempo-maŝino — Lando de la blinduloj (H.G. Wells) 16.— F
  - n° 5 — Princino de Marso — (E.R. Burrough) 16.— F
  - n° 6 — Colombo (Prosper Mérimée) 16.— F
  - n° 7 — Sep vangofrapoj (K. Aszlanyi) 30.— F
  - n° 8 — La virineto en bluo (Mason Stuttard) 30.— F
  - n° 9 — Brulanta Sekreto (Stefan Zweig) 30.— F
  - n° 10 — Kiso de la reĝino (J.F. Naŝivin) 30.— F
  - n° 11 — La Karnavalo kaj la somnambulino (K. L. Immerman) 30.— F

47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4 - 11 Aŭgusto 1962

Sub la alta Protektado de la Dana Ĉefministro, Viggo Kampmann.

NOVA konstanta adreso :

ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

## OFICIALA KOMUNIKO.

**Nova Konstanta Adreso.** Pro la translokiĝo de la Centra Oficejo de U.E.A. ni atentigas ke la nova konstanta adreso de la 47-a Universala Kongreso estas : Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

**TEJO-Kongreso.** La 18-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. okazos de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1962 en Ystad (Svedujo). Por informoj kaj aliĝiloj : S-ro Nils-Erik Kristoferson, Zederlundsgatan 11 B, Motala, Svedujo.

**Adoptaj Gepatroj.** Por helpi al esperantistaj infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun malfortaj devizoj, la Loka Kongresa Komitato starigis la fondajon " Adoptaj Gepatroj ", kun kotizo de 30 ned. gld. La ricevitaj sumoj estos utiligitaj nur por pagi veturadon kaj la restadon al tiuj infanoj.

**Karavano.** Anoncis karavanon : Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W 11, Anglujo.

**Scienca Konferenco.** La partoprenontoj al la " Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco " estas petataj sin anonci kiel eble plej frue al la Prezidanto de la Organiza Komitato, D-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, Kobenhavn K., Danlando, aŭ al la Centra Oficejo de U.E.A.

**Statistiko (ĝis fino de februaro):** Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 13, Brazilo 4, Britujo 111, Bulgarujo 7, Danlando 176, Finnlando 31, Francujo 76, Germanujo 71, Grekujo 2, Hispanujo 6, Hungarujo 1, Irlando 1, Islando 2, Israelo 2, Italujo 39, Japanujo 7, Jugoslavio 21, Kanado 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Meksikio 2, Monako 2, Nederlando 60, Norvegujo 6, Nov-Zelando 1, Pollando 14, Portugalujo 7, Svedujo 111, Svisujo 7, Usono 9. Entute 798 el 34 landoj.




RABATO POR ESPERANTISTOJ






# ECENZOJ

**Ŝtefo Urban: « Nova Ezopo ». 128 paĝoj. Prezo: 1 Us. Dol. En la serio de la « Beletraj Kajeroj » eldonis: « Stafeto » de Prof. Dr. J. Regulo-Perez, La Laguna, Kanariaj Insuloj.**

Ankaŭ, sed ankoraŭ pli post legado de la libreto, oni volas scii kelkajn detalojn pri la verkinto ĉu, laŭ la titolo, sin konsideras iom kiel novan Ezopon; ne (ne tute senpruve!). Estas do despli bedaŭrinde ke nek en la antaŭparolo, nek ie ajn ni trovas tiajn sciigojn. Oni trovas kelkajn notojn en la « Esperanta Antologio », sed nenia estas(jure)devigata posedi ĝin; kvankam kompreneble ĉiu devus, almenaŭ, havi ĝin. Do, la aŭtoro kies spritan sarkasmon ni ĝuas en tiu-ĉi volumeto, estas Ĉeho 48 jara, komponisto kaj muzikprofesoro. Bedaŭrinde ke ne povas ekzisti sarkasma muziko ! La aŭtoro meritas la kvalifikon de nova Ezopo ĉar li paroligas la naturon. Tiel li donas la animon de bestoj kaj kreskaĵoj. Trafas la komparpunktojn aŭ kontraŭojn kiujn li trovas en ekz. karoto kaj rozo (p. 38); en papilio kaj nekroforo (p. 26). Laĝenerala tendenco estas ke utileco ne estas ĉio en la vivo, eĉ ne la plej grava afero ĝi estas. Mi rekomendas la libreton unue al la E-o. grupoj. Ili trovos en ĝi abundan materialon por fari ekzercojn dum grupvesperoj. Ili lernos multajn vortojn. Ili ofte ridos. Efektive, mi ne scias kion mi devas plej admiri: ĉu la trafajn respondojn, ĉu la respondojn kiuj savas el malfacila situacio. Mi rekomendas due al ĉiuj moralistoj, profesiaj kaj ne. Multloke la verketo estas komparebla al « Pluk » de P. Thorsen. Se, trie, mi rekomendas ĝin ankaŭ al ĉiuj poeziamantoj, estas tamen kun kelkaj « rezervoj ». Ne ĉiuj poemoj estas same altnivelaj. Se ekz. « Biblioteko » (p. 105) kaj « La Spegulo » (p. 96) estas vere bonegaj kaj sencoplenaj, kontraŭe « La Poŝtuko » ne estas sufiĉa por aperi en poemaro. Kelkaj aliaj estas tro mallongaj kiel ekz. la ŝerco nomita « Guto » sur paĝo 70. Sed absoluta troigo estas la poemo « Larmo » kiu konsistas el du versoj, kvar vortoj... sur la tuta paĝo 94. Cetere oni legas la tutan libreton en unu kaj duona horo ! Tamen, tamen, valoras posedi kaj legi ĝin. Vere ! Mi aldonu ankoraŭ ke la ekstero plaĉas kaj ke la desegnaĵoj — en konkordo kun la teksto — estas belaj. Kaj post legado oni devas regluigi la koverton ! La tre mallonga antaŭparolo de Poul Thorsen estas rimarkinda pro ĝia ideologia flanko. La esperanto-movado havas ideologion ! Tro multaj ne ankoraŭ scias tion ! Tie ili trovos eron de ĝi.

Drs. F. R.

**TOTALA SUNEKLIPSO 15.11.61.** Ekstra eldono de « Malgranda Naturscienca Societo Zagreb ». Tridekdupaĝa broŝuro enhavanta krom ilustrita artikolo pri la astronomia lastfebruara evento tre interesajn informojn pri la fervora agado de « junaj astronomoj esperantistoj » en Jugoslavio: Verkado de « Tragedio en Universo », Prelegoj esperantaj, radiodissendoj, organizo de restadejo ĉe Adriatika marbordo, ktp. Tiu priskribo de idealista gejunularo estas plej kuraĝiga legaĵo. Ni — veteranoj — sentas varmon en la koro, vidante, ke la torĉo ne falos el niaj manoj. Pri la lingvo mi tamen devas elmeti kelkajn riproĉojn. Nur unu ekzemplo pri ĉia mankospeco: Tro facilanima kreado de neutilaj neologismoj (p. 10 ELANO anst. impulso) uzado de UNU kiel artikolo (P. 3, 6 k.a.) Neĝusta signifo asignita al kelkaj vortoj (ZONO anst. linio: « tranĉzono de du ebenoj » sub la plumo de matematikisto ŝajnas stranga paradokso ! « ni ŝuldas ankaŭ diri kelkajn vortojn » anst. ni devas... p. 9) Krom la menciitaj preseraroj restas ankoraŭ kelkaj. Entute tiu broŝuro lukse prezentita, kaj krome ankaŭ enhavanta angla — kaj germanlingvaj tekstojn estas ĝojiga legaĵo.

C. ROGISTER.

**ELI URBANOVA: Nur tri kolorojn. — Prezento de JULIO BAGHY. — Ilustrajoj de KAREL OBERTHOR. — STAFETO : Beletraj Kajeroj, 3. — J. REGULO, Eldonisto, La Laguno, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, 1960. — 19×22 cm. — 140 paĝoj+portreto de la aŭtorino. — Prezo: 1 usona dolaro.**

La ĉeha poetino Eli Urbanova ne plu estas nekonatino por la leganto de « Esperanto », kiu jam publikigis kelkajn el ŝiaj poemoj, premiitaj en belartaj konkursoj.

Sian unuan poemaron E. Urbanova senambicie difinas: skizo sobra ĝi estos, por kies simplaj bildoj ŝi uzos « Nur tri kolorojn », aŭ pli ĝuste, nur tri nuancojn de nigro.

La memportretoj (Pri mi mem) povus impresi kvazaŭ ekzercoj kiuj rafinu ŝian poetan senton kaj fleksebligu ŝian plumon. Antaŭ ŝia miranta sentemo, ŝia infaneca ĝojo, preterglitas ŝia junaĝo. Rapide, rapide. Tiel rapide ke kelkfoje nur per ekkrio, per izola frazero, ŝi povas signi kaj fiksi la fluon de la bildoj en ŝiaj tamen zorgitaj versoj. Nur kelkajn maloftajn fojojn tro konciza esprimo nin haltigas senhelpaj antaŭ dubasenca aludo aŭ frazkonstrua akrobataĵo kiel :

(p. 28) « Al Di' mi dankis, ke sen amo
nedestinite morti al mi,
sed pro feliĉo granda larmi... »

Turninte sin al la mondo ekstera, senmakula neĝmantelo sur la urbo, marmoraj nimfoj ĉe fontano ŝin kortuŝas, revigas. Ravite kaj rave ŝi pentras la misteran vivon de la arbaro (52). Unu malagorda sono en tiu harmonia versoplektaĵo:

« Mirteloj dolĉaj, fraga kamp'
konvenas al la apetito. »

Apenaŭ malpli pitoreske efikas la dua ŝippereo (88).

Kaj jen ŝi vojas sur la kampo de la rakonto: kviete fabela (Kiel princino trovis amon) aŭ male: bolanta pro amardo, superstiĉa venĝemo kaj sovaĝa krueleco, pli lirika laŭforme ol rakonta laŭenhave (Sorĉistino).

Baldaŭ, en « Gutoj de intimo », la poetino ne plu hezitas aldoni al ŝiaj tri nigraj nuancoj fajran strion de flamruĝo, la ruĝon de ŝia volupte pulseganta sango. « Ami » (93) elkrias frenezigan sopiron al senindulga kirlego de arde pasia vivo, al intensa vivoĝuo spicita per plej minacantaj danĝeroj. Sed io, ial, repuŝos ŝian fajran animon en la iluzion de ŝiaj revoj, en la ŝirajn turmentojn de nesatigitaj aspiroj.

En la 15 poemoj de la fina ciklo (al kiuj ankaŭ la tri de « El la korbo » laŭenhave, laŭtone kaj laŭforme parencas) la « Hetajro dancas » laŭ la ritmoj de la sapfa strofo. La ekstazo de ŝia ĝojo amora lastan fojon ekflamas, sed tuj ĝin forlavos korprema doloro de disiĝo, soleco, morto.

La porcirkonstancaj poemoj malpli bone impresas, se ni esceptas « Papilioj » kaj « D-ro Kamaryt ». Ilin « Diktis dankemo », diras la titolo. Kredeble. Sed inspiro ne kunhelpis.

Multaj sendube aprezos la delikatan sentemon kiel ankaŭ la pli sovaĝajn emociojn, kiujn E. Urbanova en sia poemaro vestis per zorge polurita lingvo. Eĉ se jen kaj jen la ritmo ribelas sub ŝia plumo, eĉ se ŝtopvortoj (ja, do, jen, nome) ankoraŭ altrudas sian helpon, aŭ se kelkaj vortoj ne estas klaraj: rompi manojn, 27,44; rabi, 42,81; peĉo, 72, (ĉu la germana Pech, malbonŝanco?) Ĉar estus maljuste direkti la lupeon nur al neperfektaĵoj.

F. COUWENBERG.

LA RECENZITAJ ESTAS HAVEBLAJ CE LA KOMUNO LIBRO-SERVO (Sro ISERENTANT R.) BLANKERGESTEENWEG 72, BRUGGE, P.C. 3268.51.



# GRUPA VIVADO

**BRUGO:**
**BRUGA GRUPO ESPERANTISTA — Reĝa Societo**
**(Poŝtĉekkonto: N° 4835.33)**

La 27-an de februaro, S-ino. S. Verbeke, vicprez. faris interesan paroladon kun montrado de fotografaĵoj, pri: « Bicikla rondvojaĝo ĉirkaŭ Nederlando ». La ampleksa subjekto ne povis esti elĉerpita en unu kunveno kaj estis daŭrigata la 13an de marto.

La 6an kaj la 20an de marto, la ĉeestantoj okupis sin per lernigaj ludoj.

**Programo por venontaj kunsidoj:**

Ĉiumarde, en Strijdershuis, Hallestraat, (tel. N° 347.98): je la 20a horo:

MAJO: 1an: Pro festotago ne okazos kunveno. — 8an: Raportado pri unutaga vojaĝo al Anglujo. — 15-an: Raportado pri la kvarlanda kongreso en Bulonjo. — 22-an: Magnetofona kant- kaj deklamvespero: F-ino. C. Van Parys. — 29-an: Legado de Esperanto-revuoj.

**BRUGGE « Paco kaj Justeco ».**

Dum la tuta vintro ni pasigis kune tri vesperojn. La lundon de la 19.30a ĝis la 23.30a(!) sporto: Volley-Ball-ludado. La merkredon estis ĉiam kurso kaj la ĵaŭdon okazis la ordinara laborkunveno. Estis decidite ke kiam la prezidanto ne devas paroladi, ke li enkondukos la vesperon per iu mallonga paroladeto pri iu historia temo. Tiel li sinsekve jam pritraktis la jenajn temojn: 1) venerado de relikvoj dum la Mezepoko kaj la trezoro de relikvoj en la Sta Donaciana katedralo en Brugge. 2) La Franca Akademio: origino kaj nomadoj en ĝi. 3) Profitdona profesio dum la Mezepoko: la torturisto. 4) La herezoj en la fru-Kristana tempo kaj iliaj karakteraj trajtoj. Ankoraŭ aliajn temojn li jam planas; sed li ne volas sciigi ilin antaŭe; devas esti iaj surprizoj. Tute nova programpunkto estis la « forumo ». Ni jam unu fojon havis ĝin kaj ni ripetos tion. La ĉestantaro povis fari demandojn pri difinitaj temoj kaj la kvar « saĝuloj » de la forumo respondis. Tio estis vere tre instrua. Ankaŭ la debatvesperojn ni de tempo al tempo reorganizos. La lasta temis pri la « libera volo » kaj ni venigis specialiston-psikologon por gvidi la debaton. Dum alia vespero ni aŭdigis la tre belan sonbendon de S-ro. A. Samijn « Eĉ se nur unu ». Dum la pasinta aŭtuno nia prezidanto konatigis du aliajn esperanto-poetojn; la Ĉeha Eli Urbanova kaj la alia, ankaŭ Ĉeho, la muzikologo Ŝtefo Urban. Tre taŭgis por tio la du poemkolektoj eldonitaj de « Stafeto » de Prof. J. Regulo Perez. Ni enskribigis nian grupon en la T.V. ludado « Waag je kans » (Provu vian ŝancon) kun la espero ke la bona (kaj bela) feino eltiros nianleteron el la centoj kaj centoj da demandoj kiuj kuŝas jam en la tamburo. Ni kompreneble ekzercas, same kompreneble, sub la lerta kaj sperta gvidado de festdirektoro A. Dumarey. Dum alia vespero ni aŭdigis la belajn diskojn de Simone De Koninck kiu posedas la tutan « Faŭst » kaj kiun enkondukis denove A. Dumarey. Ni ne forgesu la gramatikajn ekzercojn de R. Martens ĉiam egale amuzajn kaj spritajn kaj la enigmojn kiujn prizorgas sekretario R. Iserentant. Unu vesperon plenigis la pritraktado de « nia grupo dum la nigre nigra periodo 1940-45 ». La 14an de decembro ni festis Zamenhoftagon kune kun la alia bruĝa ĝrupo. La apogeo estis nia tradicia Kristnaskofesto. La skizo kiun verkis A. Dumarey kaj kiun ludis la sama kun Grégoire Maertens daŭris unu tutan horon kaj estis denove belega, vere belega. Kiel eblas ?! Ili ja estas artistoj ! La temo kiun la prezidanto priparolis en la kutima festparolado estis ree la ideologia flanko de la esperanto-movado en la kadro de la mondhistorio. Estus mensogo diri ke absolute ĉio okazas nur en esperanto. Sed tio estas tamen vera ke ni tre multe parolas en nia lingvo kaj ke la temoj estas pritraktataj en tiu lingvo. Ni daŭrigos tiel ĉar ni volas esti kultura movado kaj ni volas idee formi niajn gemembrojn.

BRUSELA GRUPO ESPERANTISTA GENERALA JARKUNSIDO : de la 29a de januaro 1962.

**KOMITATO:** Prezidanto: JACOBS René; Vic-Prezidanto: FIGHIERA Gian Carlo; Sekretario: NANQUETTE Maurice; Kasisto: OLEFFE Jean; Arkivistino: STAES Elly; Bibliotekistino: KESTENS Mathilde; Teknikisto: PIRON Pierre.

**FAK-KOMITATO:** Protokolistino: DEKROM Liljanka; Statistikistino: OPSOMER Simone; Punistino: DE WERCHIN Simone; Kursgvidanto: van der STEMPEL David; Kursgvidantino: JACOBS Rose; Komisaro: CASTEL Hector; Komisarino: DAEMS Marguerite.


Verreries et Miroiterie DESMECHT & Cie

LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj ; KATOKULO, por signalvitroj.


**LIEGO**
**« Lieĝa Esperantista Grupo »**

La Grupo festis, la 18an de decembro, la Zamenhof-feston, en ĉeesto de sepdeko da samideanoj, inter kiuj delegitoj de la SAT-Amikaro kaj de la Sendependa Grupo.

Al la programo, kiu estis enkondukata kaj konkludata de D-ro Pol Denoël, partoprenis diversaj amikoj kiuj, dank' al sia laboro, tre certe donis al lernantoj, kiuj ĉeestis la feston, la impreson ke Esperanto estas vere vivante lingvo.

Ni citu inter la kunlaborintoj: la junan Jean Dengis, kiu deklamis « Ho, mia Kor' » de nia Majstro, kaj « La Mevoj » de Deŝkin; F-inon Wolff, kiu plenigis plej interesan parton en la programo kun sia « Simfonio pri la Printempo », ravaj vidaĵoj pri Svisujo, kun lumbildoj kaj bonaj klarigoj.

Krome, S-ro Cyril Bande kantis dufoje tutan serion de belaj kantoj; dum tuta grupo de novaj kaj junaj gelernantoj kantis, sub gvido de F-ino Mazure, ĥore « La Fontana klara » « Patro migras en Natur », ktp.

Fine G-roj Dujardin prezentis skeĉon, kiu havis belan sukceson: « La bela Abio »; kaj « La Eŝero », kune kantita, estis sekvata de disvendato de biletoj kaj de lotumado kaj ĉio okazis en plej agrable atmosfero.

Intertempe la Grupo translokiĝis de la antaŭa ejo, afable disponigita de nia samideano S-ro Coppé, al « Le Derby », pl. de la République Française, kie okazis jam la unua kunsido de tiu ĉi jaro, dum kiu raporto estis farita pri la reunuigo de la neŭtrala movado en « Belga Esperanto-Federacio ».

La « Sendependa Esperantista Klubo », kiu sin dediĉis al la reunuigo de la esperantistoj de la Lieĝa regiono, likvidiĝis pro la fakto, ke ĝia agado iĝis sencela ĉar la neŭtrala grupo kaj la SAT-amikaro decidis estonte sin direkti al la ne-esperantista publiko en « Lieĝa E.K.I. », kiu de nun zorgos pri la komunaj aferoj.

Dum kunsido, kiu okazis la 22an de februaro, S-ro Coppé pritraktis ĵudon, ĉu sporto ĉu sindefendilo... Okazis demonstracioj... kiuj ĉefe pruvis ke tiajn provojn oni prefere faru en betona domo ! La ĉeestantoj tamen nun scias ke estas ne tiel simpla afero, kiel povus unuavide ŝajni !

Se ne jam estas regula programo, la lieĝanoj tamen ne malesperu: Oni estas sur bona vojo !




se vi parolas pri STROVI... vi pensas pri viandaĵejo. se vi pensas pri viandaĵejo... vi aĉetas ĉe

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :
GARANTIO pri
bona kvalito
kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala » 33408

STROVI estas unuaranga!



★ por viaj eksterlandaj transpagoj
★ por ŝanĝoj en la plej alta kurzo
★ por vojaĝdevizoj

Bank van Roeselare & Westvlaanderen
Sidejo : ROESELARE
Noordstraat, 38 Belgujo

*38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.*

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr. 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |



— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint-Kruis Brugge —